Zone euro : 3,50 € Autres pays : 4,50 €

www.sat-amikaro.org

# La SAGO

## La Sat-Amikara GazetO

**Espéranto : vers une culture sociale sans frontières.**

Mensuel 78

Octobre 2011

# Ĉu Esperanto progresas ?

# Certe, sendube... sed ne senbude !

Pliaj budoj p.2...















**Plu moviĝas la Movado**
**Pliaj budoj**

# FESTOJ DE LA ASOCIOJ 2011



La 10-an de septembro, okazis en ***Melun*** (77) forumo de asocioj. Partoprenis Esperanto Val de Seine. La morgaùan tagon, alia forumo okazis en ***Vaux le Pénil*** (apud ***Melun***).

Gratulojn pro la sukcesa agado !

**Raymonde Coquisart**



Por la festo de la asocioj en «***Choisy le Roi***» (Ŝoazi), kie inter la diverseco kaj originaleco de la distraĵoj, Esperanto 94 reprenis faradon de krespoj, kiel antaŭ pluraj jaroj, kun nova materialo, kiu povos utili por aliaj renkontiĝoj. Sukcesa afero !

La krespoj (preparitaj de Kristiano) altiras homojn kaj dum la atendo, eblas paroli pri esperanto kaj instigi al subskribo de la peticio « Esperanto ĉe abiturientekzameno »...

Silviano, kiu respondecis pri la peticio, helpita de Didjeo, Danjelo kaj Viljamo (de Esperanto-Francio) kolektis preskaŭ 150 subskribojn.

Plie, niaj fortoj devis esti dispartigitaj inter la festoj: en Ormesono, Tereza kaj Reĝiso zorgis pri la budo. Oni eĉ ankaŭ povus proponi budon en La Queue en Brie.

Ni profitis belegan tagon sabate, eĉ varmegan, tamen je la 12a ni estis sub ombro. Dimanĉe, post fulmotondro de la 15a ĝis la 16a, la homoj venis multnombraj.

Resume, ni havis multajn kontaktojn, donis multnombrajn klarigojn, renkontis homojn mirigitajn, interesitajn (malmultaj adresoj lasitaj, malfeliĉe). Ni aparte strebis al la peticio.

**Kristiano kaj Tereza**

## Svat(?)-Anonco



Suzi', parizanino, deziras komenci sian vivon de juna emerito kantante.Ŝi emus renkonti junan emeriton, disponan*, bone konservitan, kun humursento, povantan ŝin akompani piane k/aŭ gitare. Repertuaro: Kanzonoj (piane: La Jakvo-Fratoj ***Les Frères Jacques***).

Interesatoj kontaktu La Sagon.

__Noto de la redaktejo :__

Kvankam ni tute ne kutimas publikigi tiajn anoncojn, ni tion faras kun espero, ke la onta dueta paro riĉigos la kulturan programon de la onta kongreso en Ĉatoruso, per vespera koncerto.

* Kaj kiel kompreni «disponan» ? Ĉu helpopretan aŭ spiritliberan ? Eble simple «disponeblan» ? ;-)

## E–kuiru !
## *Kukurbeta tortiljo*



***Por manĝi kiel aperitivo.***

- 700 g da kukurbetoj
- 10 ovoj
- 3 cepoj
- olivoleo
- petroselo
- 70 g da raspita fromaĝo
- salo, pipro

Ŝaltu la fornon je 160°C

Lavu kaj raspu la kukurbetojn

Lavu kaj tondu la petroselon.

Senŝeligu kaj tranĉu la cepojn.

Fritu la cepojn en pato kun iom da oleo, dum proksimume 3 minutoj.

Aldonu la kukurbetojn kaj miksu, pipru, salu kaj kuiru dum 10 minutoj je meza varmo. Atentu ke ne plu estu akvo.

Preparu la ovojn en salatujo: bone miksu ilin kun petroselo kaj fromaĝo.

Verŝu la unuan preparaĵon en tortujon kaj aldonu la ovojn supre.

Lasu en la forno dum 20 minutoj proksimume.

Servu en kvadrataj pecetoj per pikiloj

**Flora Markov**

# Pri la 67a SAT-Amikara Kongreso *Naturapolis*, Ĉatoruso, 7an-10an de Aprilo 2012

Ne multe mankis, ke la 67a SAT-Amikara Kongreso ne okazus. Tuj post ĝia anonco en Burĵo fine de la kongreso en Seto, oni eksciis, ke la planita kongresejo ne povos plenumi nian rezervadon. Post longa serĉado en aliaj lokoj, aperis ebleco en Agrikultura lernejo de Ĉatoruso (Châteauroux 36), dank' al efika zorgo de ***Maryvonne Houvier*** (ŝi estu dankata). Ni ricevis sufiĉe frue principan konsenton sed ni devis atendi la septembran malfermon, por informiĝi pri la efektivaj kondiĉoj.

### *La pozitivaj punktoj:*

Ĉio okazos en la sama loko: kunvenoj, manĝoj, dormejoj (krom por tiuj kiuj elektos tranoktadi en la apudaj hoteloj).

La prezoj estos sufiĉe malaltaj - tute kompareblaj al tiuj de Seto, eĉ eble malpli.

La kunven-salono estas tre granda, bone ekipita, ligita al antaŭ-ĉambro kie facile povos instaliĝi akceptejo kaj libroservo. La labor-ĉambroj estas tute apudaj.

La alveno per aŭtomobilo kaj parkado estas ege simpla.

Ĉar ĉe la centro de Francio, malmultaj havos terure longan vojaĝon por fari.

### *La malpli pozitivaj:*

Ĉar la Paska periodo ne koincidas kun ferioj en ĉi regiono, la lernejo povas disponigi al ni la lokojn nur dum la strikta semajnfino, t.e. ke la ĉambrojn oni disponos nur por du noktoj (Sab-Dim kaj Dim-Lun) kaj la kunvenlokoj nur por tri tagoj (Sab-Dim-Lun).

La unua konsekvenco estas ke ne eblas organizi la tradician tuttagan ekskurson de la sekvanta Mardo laŭ tradicia formulo: ĝi devos okazi kun deirpunkto ekster la kongresejo.

Alia malavantaĝo kuŝas - se mi kuraĝus tiel diri - en la kuŝ-kondiĉoj, nome ke la pensionuloj zorgu mem pri siaj littukoj, kaj do la lernejo disponigas nur litojn. Tio evidente valoras por la gastoj, kiuj ni estos. Do por uzi la dormeblecojn de la lernejo, vi devos kunporti vian dormsakon. Tiujn kondiĉojn ni jam konis en antaŭaj kongresoj, kaj tutcerte ni trovos solvojn.

Ankaŭ sciu, ke malmultas la unuopaj ĉambroj, ke la maksimuma nombro da litoj estas 150 (ĝenerale en ĉambro, kun du litoj izolitaj per «leĝera» vando). Nececejoj kaj lavaboj/duŝoj estas komunaj, sed en izolitaj kajutoj tute komfortaj.

Ja temas pri lerneja pensiono, ne pri hotelo.

Ekzistas en la apudejo malmultekostaj hoteloj, sed ni ne povos zorgi pri la iro/reveno al/el tiuj hoteloj. La busoj estas senpagaj en Ĉatoruso, sed ne funkcias Dimance - eble ankaŭ ne la feritagan Pask-Lundon.

Parkumi en kaj ĉirkaŭ la lernejo estos ege facile, ruldomoj povos tranoktadi en la ekstera parkumejo, sed disponos pri neniaj konektoj (elektro, akvo, forflugilo...).

### *Konklude*

Sufiĉe rudimentaj kondiĉoj, sed ne forgesu ke ĝi estas organizata sen loka grupo, kaj kun mallonga preparad-tempo.

En la venonta numero, ni verŝajne jam povos doni pli da indikoj rilate kaj la programon, kaj pli precizajn materiajn kondiĉojn.

Sed jam, kiuj planas partopreni en la programo (per paroladoj, debatoj, ekspozicioj, ktp) tiuj sin anoncu ĉe La Sago.

**Serĝo Sir',**
**nome de la OKK**
**(Organiza Kongres-Komitato)**

# Enhavo


| | |
|---|---|
| **SAT-Amikaro** | |
| Pri la 67a kongreso | 3 |
| SAT Kongreso en Sarajevo | 13 |
| **Analizoj/opinioj** | |
| Rigardo al CIAo | 4/5 |
| «Milda» elstermado de frenezuloj | 6 |
| Pri komunikado, instruado, lernado | 10 |
| **Lingvo** | |
| Legindaj legendoj | 10 |
| Kiel traduki : Coup | 7/8 |
| **Libro–servo** | 8 |
| **Recenzoj** | |
| Libro vivas pli longe ol unu sezono | 9 |
| **Malhela paĝo** | 11 |
| **El franclingvio** | |
| El «La Riverego»: Ci kaj Vi en Eo | 12 |
| **Humuraĵoj-diversaĵoj** | |
| E-kuiru. | 2 |
| Selle-humuraĵoj | 12,13 |
| BD: La Tribuloj | 16 |
| **Kursoj/staĝoj** | |
| San-Briego | 6 |
| **Plu moviĝas la Movado - Le Mouvement en mouvement** | |
| Budoj: Homara Festo, Merlieux | 1 |
| Pliaj budoj: Meluno, Ŝoazi, Ormesono | 2 |
| Interkant' (Karmen') en Bureso | 14 |
| Vinilkosmo | 14/15 |
| Parizo, ĉe la sidejo | 14/15 |
| Muzika staĝo en Bureso | 15 |
| Trevor Steele prelegoj | 16 |



**LA SAGO.** CPPAP n° 0312 G 86224.
ISSN: 1763–1319.
Directeur de la Publication : Guy Cavalier.
Impr. TROISA, 91480 Quincy–sous–Sénart.
Dépot légal à parution.

***Ĉefredaktanto*** : Vito Markovo. ***Enpaĝiganto:*** Serĝo Sir'. ***Redakt– kaj korekt-skipo :*** Andreo Andrio, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir', ***kun helpo de:*** Francua' Dekurcelo, Janine kaj Yannick Dumoulin, Véronique Girard, Phil Guichet, Jorgos.
***Partoprenis en ĉi numero:*** Andreo Andrio, Raymonde Coquisart, Cyrille Découture, Libnjo Duboto, Flo, Geneviève Gaubert, Louis Gohin, Mirejo Grosjean, Klod, Kristiano, Franjo Lévêque, Francisko Lorrain, Flora Markov, Vinko Markovo, Vito Markovo, Lin' Morel', Ĵak Le Puil, Jean Selle, Serĝo Sir', Tereza, Juliette Ternant.




## Kontribuaĵoj *Contributions*

**Ĉiam bonvenaj ! Sendu ilin al la redakta korespondanto:**
***Toujours bienvenues ! A faire parvenir au correspondant de rédaction:***


**Serge Sire** (Serĝo Sir')
85 impasse des Fées 74330 Sillingy
Reto : **lasago@free.fr**


■ Prefere per reto, **tekstoj** en RTF– aŭ TXT–formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, **bildoj** en TIFF–, JPEG– aŭ GIF–formo.
■ Eventuale sur papero, tekstoj ***prefere*** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) Ne tajpitaj kontribuaĵoj publikeblas nur se volontulas iu tajpanto.
■ Artikoloj ricevitaj post la 20a de iu monato ne povas esperi aperigon en la numero de la sekvonta monato.

■ *de préférence par internet,* ***textes*** *en format RTF ou TXT pour un document joint, et* ***images*** *en format TIFF, JPEG ou GIF.*
■ *éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge) Les articles manuscrits ne peuvent être publiés que si nous disposons de dactylos bénévoles.*
■ *Les articles reçus après le 20 du mois ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro du mois suivant.*


**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.**

**Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto**

# Le Mouvement en mouvement




## Francia turneo

Très belle affiche profesionnelle de notre ancien maquettiste Cyrille Découture pour une conférence attractive, organisée par Esperanto 80…

| | |
|---|---|
| Lilo *(Lille 59)* | 12-15*° |
| Amieno *(Amiens 80)* | 17 |
| Kaeno *(Caen 14)* | 18-20*° |
| Manso *(Le Mans 72)* | 20-23*° |
| Perigozo *(Périgueux 24)* | 23-26*° |
| Burĵo *(Bourges 18)* | 27* |
| Parizo | 28-31*° |

*° Informiĝu pri la preciza dato kaj horo*
** Informiĝu pri la temo.*



**Notre conférencier « Témoignages du Monde » sur LES ABORIGÈNES ? TREVOR STEELE**

**Qui est Trevor Steele ?**

**Trevor Steele** (né en 1940) est un espérantophone australien.

**Enseignant** au collège en Australie, il a enseigné les langues (anglais, allemand, latin) ainsi que l'histoire.

Il a aussi vécu de par le monde et plus particulièrement en Allemagne où a été aussi assistant social.

*Trevor Steele*

Du début 2002 jusqu'à avril 2004, Trevor a travaillé comme **directeur général** de **l'Association mondiale d'espéranto** (Universala Esperanto Asocio – UEA) au siège de l'association à Rotterdam aux Pays-Bas.

Il se définit avant tout comme **enseignant** et **écrivain**. Il est l'auteur de plus d'une dizaine de romans et nouvelles écrits directement en espéranto.

Son œuvre littéraire est fortement influencée par ses expériences de voyages en Allemagne et à travers l'Europe de l'Est et par son pays natal.

Il est également membre de l'Académie d'Espéranto, l'équivalent espératophone de notre Académie française.

Officellement retraité, il enseigne néanmoins toujours, à raison de quelques semaines par an, dans des écoles utilisant la pédagogie alternative **Steiner-Waldorf** et continue de beaucoup voyager surtout grâce aux réseaux espérantophones.

**Mukunda Raj Pathik du Népal et…**
**Jasuo et Bin du Japon** (désolé, ce petit tract est trop petit pour mettre les frimousses de toutes les personnes que nous avons reçues grâce à l'espéranto) ! ;-)

**Pour plus de renseignements**

Cyrille Découture 06 30 60 66 14 prezidanto@esperanto80.org
Daniel Devis 03 22 47 30 11 ddevis@wanadoo.fr

## La Tribuloj - 3

